



Boletín

nº 451 Julio - Septiembre 2025



Boletín
Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 451

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: José Antonio del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio
Federación Española de Esperanto

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIADOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: Ángel Arquillos López

Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero

Sekretario: Manuel Parra

Vicsekretario: Elsa Martínez Castro

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)

“ María Milagros Mezo

Junularaj aferoj: Pako Balibrea

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)

DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400 (pdf-a)

ISSN 2444-8397 (papera)

SALUTVORTOJ

Karaj gelegantoj,

Post la sukcesa kongreso okazinta en la t.n. urbo de la poetoj, (Sorío) kun ĉeesto de pli ol 150 homoj el la tuta Hispanio kaj eksterlando, en la urbeto Portugalete, tre proksime al Bilbao, oni aranĝas la venontan 84-an Hispanan Kongreson de Esperanto, kiu okazos de la 14-a ĝis la 18-a de julio kaj jam eblas aliĝi, kaj sur la malantaŭa kovrilo vi havas la aliĝilon. Ni devas superi la nombron de partoprenantoj el Sorío kaj mi opinias, ke restas multe da tempo antaŭ ni.

Ne hezitu aliĝi por vigligi ceterulojn!

Kiel kutime vi trovos novaĵojn pri aliaj kongresoj kaj esperantaj eventoj, kaj ĉi foje pri poezio kaj kantoj kaj interesaj novaĵoj pri la naturo, matematiko, ktp

Boletín ne temas nur pri informo de la movado en Hispanio, ĉar la enhavo estas tre varia kaj malferma al ĉiu, kiu volas kunlabori. Se vi volas prezenti poemon aŭ ajnan tekston kun interesa enhavo, ne hezitu kaj decida nun. Ni antaŭĝojas pri via kunlaboro.

Ĝuu la legadon.
Ángel Arquillos
Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
Raporteto pri la estrarkunsido 21/09/2025	3
Loka Kongresa komitato, (Portugaleto)	4
CCBP celebras la Esperanto-Tago	5
Pri Grupoj kaj Asocioj	7
Anonciĝis Internaciaj Kongresoj por 2026 en Hispanio	11
Nova eldono de la kursoj de UNED	12
Invitu la Universalan Kongreson 2027 aŭ 2028	12
Rezultoj de la Premio Pirlot	13
Mediteranea Esperanta Semajno	15
Kursoj en Kastelo Greziljono	16
Duoblaj fervojaj linioj	17
La 110-a Universala Kongreso en Brno	20
La Stranga Angulo, ĉapitro 16	22
Ekologiaj Ŝuldoj	24
Refuto de poezio kaj parolo	25
Hispanaj kantoj, tradukitaj de Liven Dek	26
Birdoproverboj	27
Sed, ĉu vere ili tion ne vidas?	28
Iom da Matematiko	29

NOVA ESTRARO DE UEA (2025-28)

La 26an de julio 2025 la Komitato de UEA elektis novan estraron por la Asocio. La nova Estraro de UEA enoficiĝis la 27an de julio, post la fino de la dua kunsido kadre de la ĝenerala kunveno de la Komitato, kiam ĝi akceptis la raportojn de la tiame eliranta antaŭa estraro. La novan Estraron de UEA konsistigas: Fernando Maia Jr (Prezidanto), Seán Ó Riain (1a Vicprezidanto), So Jinsu (2a Vicprezidanto), Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario), Gong Xiaofeng Arko, Zdravka Boytcheva, Miora Raveloharison, Jérémie Sabiyumva kaj François Lo Jacomo.

RAPORTETO PRI LA ESTRARKUNSIDO 21/09/2025

La pasintan 21an de septembro kunsidis (virtuale) la estraro de HEF. Jen iom el la aferoj traktitaj.

La prezidanto de HEJS, nia junulara sekcio, planas organizi ĉeestan kurson aŭ renkontiĝon por junuloj en 2026, prepare por partopreni en la IJK. Jam tio estis traktita en Sorio, en kunveno kun junuloj, kie aperis diversaj ideoj, sed nenio konkretiĝis. La nuna plej probabla plano estas intensa kurso komence de julio en la universitato de Leono.

La kasisto esploras pri la kosto kaj kondiĉoj por ke HEF havu bankan karton.

Ni diskutis proponon pri eblaj stipendioj por pagi la matrikulon de la kursoj de Esperanto en UNED. Post detala konsidero, ni decidis ne doni stipendiojn.

Ni komentas la progreson de la organizado de la venontjara kongreso en Portugalete. Jam funkcias la retejo, kun aliĝilo kaj provizora programo. La nuna nombro de aliĝintoj estas ĉirkaŭ 20. La ĉefa salono de la kongresejo havas ĉirkaŭ 80 lokojn. Dum la kongreso funkcios libroservo.

Ni komentas, ke post kelkaj tagoj ekos la ekspozicio en Teruelo, kun posta kurseto. La fondaĵo Fundación Ibercaja konigis tiujn eventojn al ĉiuj urbanoj per distribuo de papera broŝureto al ĉiuj domoj.

La kasisto informas, ke HEF gajnis 2800 € pro la kongreso en Sorio. Ni dankas la homojn, kiuj organizis ĝin kaj aparte la prezidantaron de la organiza komitato.

La sekretario

LOKA KONGRESA KOMITATO (LKK)

HEK PORTUGALETE 2026

PREZIDANTO: Jesús Miguel García Iturrioz

SEKRETARIINO: Milagros Mezo del Río

KASISTINO: Yolanda Díez Sáiz de la Maza

KONGRESLIBRO: Enriqueta Sesmero Cutanda

AMASKOMUNIKILOJ: Susana Zabaco Pérex

PROGRAMO: Yolanda Díez Sáiz de la Maza Carlos Llama Salazar Jesús Miguel García Iturrioz

EKSKURSOJ: Yolanda Díez Sáiz de la Maza

RETAFEROJ: Miguel Ángel Sancho Pardo

KULTURA PROGRAMO: Susana Zabaco Pérex

IDENTIGILOJ, AFIŜO POR FOTOJ, ... Patxi de la Hoz Méndez

KONGRESEJO: Octavio Gutiérrez Moja, Alberto Lobato Reguera

LASTE ...



Danke al sindonemo de hispana esperantisto, la 50 unuaj aliĝintoj al la 84a Hispana Kongreso de Esperanto ricevos donace la kanton “Amikoj” de la afrika kantisto Chris Freddy.

La kanto aperos en bitalbumo publikigota de Vinilkosmo ĉi-aŭtune. Kaj tuj kiam ĝi estos surmerkata, tiuj 50 unuaj aliĝintoj ricevos ligilon por elŝuti la kanton, ĝui ĝin premiere kaj konservi ĝin por sia propra plezuro.

Kompreneble, por tiuj kongresanoj, kiuj loĝas en la sama adreso, estos nur unu ligilo

CCPB CELEBRAS LA ESPERANTO-TAGON

La Kolektiva Katalogo de la Bibliografia Heredaĵo (Catálogo Colectivo del Patrimonio Bibliográfico, CCPB) proprainiciate celebris la Esperanto-Tagon ĉi-jare. Por tiu okazo, ĝi afiŝis en siaj sociaj retejoj informon pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj, kun ligiloj al la serĉrezultoj en sia katalogo.

Ekde 2022, CCPB disvolvas la projekton integri parton de la katalogo de Biblioteko Juan Régulo Pérez (BJRP). Temas pri tiuj risurcoj eldonitaj ĝis 1958. BJRP kunlaboras en tiu projekto. Pli detalaj informoj troveblas en Boletín, n-ro 443, p. 6-7.

Ankaŭ en la ĉefpaĝo de BJRP disponeblas ligiloj al CCPB kun la koncernaj serĉoj, ĉar la informo povas esti interesa por la uzantoj de nia katalogo.

The screenshot shows the CCPB website interface. At the top, there's a header with the CCPB logo and navigation links like 'Inicio', 'Marcados', 'Buscar y más', and 'Ayuda'. Below the header is a search bar with a dropdown menu set to 'Búsqueda General'. To the right of the search bar is a 'Digitalizado' toggle switch. Below the search bar, there's a button 'Búsqueda General - Modificar búsqueda' and a 'Historial de búsquedas' dropdown. The main content area shows 'Búsqueda General (659 registros)' with '659' circled in red. Below this is a list of search results. The first result is for 'Azorín Izquierdo, Francisco (1885-1975)' with the title 'Universala terminologio de la arkitekturo : (arkeologio, arto, konstruo k. metio)'. The result includes the author's name, a brief description, the publication year (1932), and a document ID (CCPB001455490-9). There are also icons for 'Monografías' and 'Digitalización'.

<https://ccpbe.cultura.gob.es/CCPBOPAC/cgi-ccpbopac/abnetop/OcA7aAPprNYxsRcfDaAguCgF9sR/NT1>

En X: <https://x.com/librolecturagob/status/1949054588860146115/video/1>; kaj en Facebook: <https://www.facebook.com/share/v/1E1mXsq82Y/>
<https://hdl.handle.net/11013/7095>
<https://bibliotekojrp.esperanto.es/>



← Post



DG del Libro, del Cómic y de la Lectura
@librolecturagob

...



¿Sabías que hoy se celebra el [#DíadelEsperanto](#)?

En nuestro catálogo ([#CCPB](#)) recogemos publicaciones en [#esperanto](#) y en otras lenguas artificiales que nacieron con sueños de entendimiento universal.

+ en 📌

<https://ccpbe.cultura.gob.es/CCPBOPAC/cgi-ccpbopac/abnetop?ACC=258&DI=33>



Listoj ▾

Serĉhistorio

Biblioteko Juan Régulo Pérez

Biblioteka katalogo ▾



[Detala serĉo](#) | [Aŭtoritatoserĉo](#) | [Nubo da temoj](#) | [Biblioteko](#)

Hejmo

[Bitoteko](#)

[Tradukoteko](#)

[Esperantistaj bibliotekoj](#)

[Manlibro pri katalogado \(RDA\)](#)

[Formato MARC 21](#)

[Deŝuti rikordojn](#)



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

Citajo de la tago

Nova balailo bone balaas. ~ Esperanta proverbaro

BONVENON!

Bovenon al nia retkatalogo. Trovu en ĝi informon pri la dokumentoj disponeblaj en nia biblioteko, kiu celas doni aliron al ĉiaspekaj bibliografiaj materialoj jen verkitaj en esperanto, jen iel rilataj al esperanto kaj ĝia kulturo eĉ se verkitaj en aliaj lingvoj.

HORARO

Ĉiujn nefestajn lundojn inter la 18:30-a kaj la 20:00-a horoj. Tamen, konsilindas sinanonci antaŭ alveni. Por eventualaj vizitoj ekster tiu horaro aŭ dumsomere, bonvolu interkonsenti [retpoŝte](#) kun la prizorganto.

AVIZO

Ekde januaro 2025, Biblioteko Juan Régulo Pérez uzos la novan RDA-kodon por la katalogado de monografioj. Retrokatalogado laŭ la nova normo okazos nur laŭ bezonoj kaj ebloj.

[Esperantaj verkoj en la Kolektiva Katalogo de la Bibliografia Heredaĵo](#)

[Aliaj planlingvoj en la Kolektiva Katalogo de la Bibliografia Heredaĵo](#)

Nia kolekto

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

SEGOVIO

Frenezzono. Esperantista fanzino

Nova publikaĵo el Segovio

En la hispana urbo Segovio naskiĝis speciala projekto, la fanzino “**Frenezzono**”. Ĝi estis kreita kiel fina aktivaĵo de la studentoj kaj instruistoj de la “**Curso de iniciación al esperanto**”, okazinta dum la unua duono de 2025 en la Publika Biblioteko de Segovio.


La fanzino montras la rezulton de komuna strebo kaj kolektiva kreemo. Ĝi ne estas nur kolekto da tekstoj, sed vera mozaiko: artikoloj, poemoj, komiksoj, muzikpartituroj, kolaĝoj kaj eĉ figuroj por tondi; ĉiam kun humuro. La enhavo spegulas la ĝojon kaj spontanecon de la lernantoj, kiuj transformis sian lernadon en kultura sperto.

La titolo “**Frenezzono**” simbolas liberan zonon, kie oni povas esprimi sin senbarile, de seriozaj reflektoj ĝis ludemaj eksperimentoj.

La unua numero estis presita kaj distribuita en Segovio senpage. Ĝi ricevis favoran atenton de la lokaj amaskomunikiloj. Pro tio, la aŭtoroj nun konsideras la eblecon daŭrigi la projekton.

Frenezzono pravas, ke esperanto, eĉ por komencantoj, povas tuj funkcii kiel ilo por kultura produktado kaj komuna amuziĝo.

David Trigo Pérez. Segovia Esperanto-Asocio



SEVILO



Kiel okazinte en lastaj jaroj, la 10-an de aŭgusto oni celebris la Omaĝon al Blas Infante (la patro de la patrio andaluzia).

Nome de la Sevila kaj de la Andaluza asocioj (SEA kaj AEU) oni oferis florbukedon kun ties ambaŭ nomoj kaj la vorto Esperanto apud la monumento ĉe la loko kie li mortis en 1936.

Prezidanto kaj Sekretario de SEA rolis en tiu akto

MADRIDO

EN LA LONDONA KLUBO



La prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo, Félix Jiménez Lobo, vizitis la Londonan Esperanto-Klubon (LEK) dum ili kunvenis fizike la 8an de aŭgusto. Li prezentis sin kiel prezidanton de MEL, kaj salutis nome de la asocio al LEK.

En la foto videblas famuloj kiel Anna Löwenstein kaj Stano Marček

NOVA KURSO EN LA SIDEJO

En tiu ĉi monato oktobro komenciĝas nova ĉeesta kurso de Esperanto en Madrido por komencantoj. Ekde la 21a de oktobro 2025 ĝis februaro 2026, ĉiujn mardojn ekde la 18,30 h. en la sidejo de Madrida Esperanto-Liceo, str. Rodríguez San Pedro, 13 (metrostacio San Bernardo aŭ Argüelles). Enskribiĝu ĉe: <http://mallonge.net/courseomadrid>

La instruisto estos la nova ano Javier Vílchez. Li prelegos la 9an de oktobro en la Centro Cultural Galileo (str. Fernando el Católico, 35) je la 19a horo, pri Esperanto, kaj por prezenti la kurson.

CURSO DE ESPERANTO EN MADRID

*El idioma más fácil del mundo.
¡que te abra las puertas a otras lenguas!*

Modalidad: presencial
Nivel: A1 (inicial)
Periodo: del 21 de octubre de 2025 al 24 de febrero de 2026
Horario: martes de 18:30 h a 20:00 h
Lugar: calle de Rodríguez San Pedro 13 (metro San Bernardo / Argüelles)
Precio: 30 euros (incluye material)

Inscripciones:
<http://mallonge.net/courseomadrid>

fb.com/esperanto.es x.com/LiceoMadrid

CONFERENCIA

ESPERANTO: NACIMIENTO, HISTORIA Y PRESENTE DE LA LENGUA INTERNACIONAL

*El idioma más fácil del mundo.
¡que te abra las puertas a otras lenguas!*

Jueves 9 de octubre a las 19:00 h
Centro Cultural Galileo
Calle Fernando el Católico, 35

fb.com/esperanto.es
x.com/LiceoMadrid

madrid.es/chamberi distrito chamberi MADRID

RENKONTIĜOJ



La 19-an de septembro oni prezentis trilingvan poemaron, hispana/ esperanta/ portugala, en la publika biblioteko “Marcos Ana” de San Sebastián de los Reyes. Temas pri “Poesía luz me urge / poezio lumo al mi urĝas / urge-me poesia luz”, de Armando Silles, kun ĉeesto interalie de la aŭtoro kaj de la tradukinto al Esperanto, Miguel Fernández

Temas fakte pri la dua prezentado, ĉar ĉeestintoj al la hispana kongreso en Sorio eble memoras ke tie okazis jam la unua diskonigo de la libro.

Pri la evento raportis la loka televido Canal Norte Digital. Vi povas spekti ĝin en: <https://www.youtube.com/watch?v=sofNgHUOorU>.

RENKONTIĜOJ



Madridanoj plu kunvenas ĉiujn unuajn sabatojn de la monato ĉe polpejo O Miño, troviĝanta en la strato Idioma Esperanto, 2. La renkontoj estas kutime malfermaj al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera, sen programo. Kiel vi povas vidi en apuda foto, la septembra renkonto estis tre sukcesa, kun dek kvin ĉeestantoj, interalie iuj komencantoj aŭ novuloj.

ZARAGOZO



Kurso de Esperanto por komencantoj.
Por alproksimigi al lingvo kaj kulturo de Esperanto.

De 21a okt. 2025 al 16a jun. 2026.
Adreso: Asocio FRATECO. Calle Cadenana, 20. Zaragoza

TERUELO

EKSPOZICIO KAJ KURSO EN TERUELO

La grupo Liberanimo organizis du agadojn en oktobro en Teruelo, ĉe la sidejo de la Fondaĵo Ibercaja. De la 29a de septembro ĝis la 29a de oktobro 2025, de lundo ĝis vendredo, de la 9a ĝis la 14a kaj de la 17a ĝis la 20:30, ekspozicio pri Esperanto estas montrata ĉe tiu sidejo (strato Joaquín Arnau, 5), uzante panelojn kreitajn de Hispana Esperanta Federacio. Kaj dum la monato oktobro, ekde la 6a, okazos kurso de Esperanto, gvidita de Alberto Granados.

.ANONCIĜIS INTERNACIAJ KONGRESOJ POR 2026 EN HISPANIO

Finiĝas jam la kongresa sezono en Esperantujo, pri kiu ni informis en la pasintaj numeroj, kun bona sukceso kaj akceptinda partopreno de hispanaj esperantistoj.

Hispana Esperanto-Federacio havis propran budon dum la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazis en la ĉeĥa urbo Brno (Burno) inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto (vidu apartan artikolon pri la UK). Maldekstre vi povas vidi Elsa-n deĵorantan en la tablo de HEF dum la Movada Foiro de la Kongreso, kaj dekstre postkongresan renkontiĝon familian kun Doktoro Zamenhof en Vieno.



Du el la aliaj internaciaj renkontoj havos konsekvencojn por la estonta agado en Hispanio. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) decidis ke ĝia venontjara kongreso okazos en Hispanio, konkrete en la urbo Leono, tuj post la hispana kongreso planita por meze de julio en la biskaja urbo Portugalete, specife inter la 19-a kaj la 26-a de julio 2026. La kongreso koincidus kun la 90-jariĝo de la Hispana Intercivitana Milito, kiu daŭre estas fonto de aktivaj debatoj en Hispanio. Estas planite havi programerojn rilatajn al tiu memordato. Pliaj detaloj aperos en: <https://eventaservo.org/e/46e555>.

Siavice, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) decidis ke la 82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos de la 9-a ĝis la 16-a aŭgusto 2026 en Tiana (proksime al Barcelono).

Kompreneble, ni havos ŝancojn informi plu pri la planoj por ambaŭ eventoj. Dume, memoru ke oni povas trovi multajn aliajn renkontojn, el la plej internacia, ĝis la lokaj kaj eĉ multaj retaj, pere de la retejo EventaServo.org.

INVITU LA UNIVERSALAN KONGRESON EN 2027 AŬ EN 2028

Post Burno (2025) kaj Graco (2026) la sekvaj urboj, kiuj gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto (UK), estas ankoraŭ nekonataj kaj la Estraro de UEA varme bonvenigas kandidatiĝojn por ambaŭ jaroj 2027 kaj 2028. Kandidatiĝoj (kaj eventualaj demandoj pri la temo) devas alveni al la Kongresa Fakto de UEA pere de la retpoŝtadreso kongresoj@co.uea.org.

La fakto, ke jam estas Landa(j) Asocio(j), kiuj formale kandidatiĝis por tiuj jaroj ne malhelpas, ke aliaj kandidatoj prezentiĝu. Estas prefero, ke en 2027 la UK okazu ekster Eŭropo kaj en 2028 denove en Eŭropo, ĉiam en regiono, kie en la proksima pasinteco ne okazis UK, sed ĉiuj kandidatiĝoj bonvenas kaj la Kongresa Fakto analizos ĉiujn eblojn.

La kandidataj urboj prefere havu aktivan kaj harmonian movadon, malmultekostajn kaj taŭgajn kongresajn ejojn, bonan infrastrukturon (urban transporton, manĝejoj, hotelojn, gastejojn k.a.), apogon de la lokaj instancoj kaj registaro, kaj ili estu turisme allogaj kaj facile atingeblaj. Kandidatoj devas detale koni la Kongresan Regularon, kiu legeblas en la retejo de UEA ĉe https://uea.org/teko/regularoj/kongresa_regularo.

La limdato por sendi la kandidatiĝojn por gastigi UK-on en la jaro 2027 estas la 15-a de oktobro 2025 kaj por la jaro 2028 la 31-a de decembro 2025.

Reprezentantoj de la Kongresa Fakto devas viziti la kandidatajn urbojn por kontroli la lokajn kondiĉojn kaj raporti pri tio al la Estraro de UEA. Laŭregule tiuj vizitoj estas principe plene financataj de la invitantaj urboj/landoj kaj kandidatoj devas esti pretaj akcepti la reprezentantojn fine de 2025 aŭ komence de 2026.

NOVA ELDONO DE LA KURSOJ DE UNED, KUN GRAVA NOVAĴO

Denove ĉijare estos instruata kurso de Esperanto en la Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED), ne nur en la du kutimaj niveloj A2 kaj B1, sed, kiel grava novaĵo, ankaŭ en nivelo B2 (laŭ la Eŭropa Referenckadro).

La kursoj B1 kaj B2 estas instruataj en Esperanto mem, do ni rekomendas ke vi sciigu pri ĝi al viaj amikoj ekster Hispanio, ĉar ankaŭ ili povas enskribiĝi, kaj tiu estas unu el la tre maloftaj kazoj en kiuj oni ricevas universitatan diplomon pro la studado de Esperanto. Vidu pliajn detalojn en tiu ĉi artikolo, aŭ en tiu ĉi en pli facila lingvaĵo de la retejo uea.facila.



Jam malfermiĝis la periodo de enskribiĝo, ekde la 8a de septembro, ĝis la 22a de oktobro. La kurso mem komenciĝos en novembro. Legu la praktikajn informojn (en la hispana, sed se vi havas malfacilaĵojn pri kompreno de la hispana, bv kontakti kun la Hispana Esperanto-Federacio) ĉe la adreso: <https://www.uned.es/universidad/inicio/estudios/idiomas.html>

REZULTOJ DE LA SCIENCAJ KONKURSOJ PIRLLOT KAJ POWER KAJ LA SCIENCA PROGRAMO DUM LA 110-A UK

Dum la Scienca Forumo okazinta kadre de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Brno estis disdonitaj la Premio Pirlot (por la plej bonaj sciencaj libroj de la jaro) kaj la nova Premio Charles Power (por la plej bonaj sciencaj prelegoj de la UK). La konkurso Pirlot estas organizita ĉiun duan jaron de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) ekde 1995 (kaj post longa interrompo denove ekde 2017). En 2025 aldoniĝis la nova Premio Power. Ambaŭ premioj estis ĉi-jare disdonitaj sub la aŭspicio de UEA. La konkursojn kunordigis Amri Wandel, prezidanto de AIS; la premiojn prezentis Aleks Kadar, Ĝenerala Sekretario de UEA, kune kun Bengt-Arne Wickström, trezoristo de AIS, kaj Vera Barandovská-Frank, rektoro de 78-a Internacia Kongresa Universitato (IKU), okazinta kadre de la 110-a UK. Ambaŭ lastaj servis ankaŭ kiel ĵurio de la premio Power, kune kun Carlos Spinola. Dum la ĵurio por la Premio Pirlot konsistis el Carlo Minnaja, Hans-Michael Maitzen kaj Bengt-Arne Wickström.

La gajnintaj verkoj elektitaj de la ĵurio kadre de la Premio Pirlot (sciencaj libroj) estis:
(unua loko) Astronomio kaj Astrofiziko por ĉiuj, A. Wandel kaj C. Spinola;
(dua loko) la IKU-libro 2025, red. A. Striganova, D. Shevchenko kaj A. Wandel;
(tria loko) La Rivoluoj de la Ĉielaj Korpoj, trad. R. Foessmeier kaj H.-M. Maitzen.

Premio Power estis aljuĝita en du kategorioj: longaj prelegoj (kiel IKU) kaj mallongaj prelegoj (kiel Scienca Kafejo).

Premio Power (longa scienca prelego):

(unua loko) La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado, Amri Wandel;
(dua loko) La ambigueco de Nombroinformo, Ekaterina Bebenina;
(tria loko) Multlingva temvortaro helpata per AI, Ilona Koutny.

Premio Power (mallonga scienca prelego):

(unua loko) Gergor Mendel, Judith Jackson;
(dua loko) Knabeto Savita de Auschwitz, Thomas Bormann;
(tria loko) Arkivistiko kaj Esperanto, Ruben Fernandez.

IKU-prelegoj kaj AIS-atestiloj por ekzamenitoj

Dum la 78-a IKU okazis 19 prelegoj: 8 IKU-prelegoj, kun 3 daŭrigaj prelegoj de AIS, kaj 8 prelegoj de la Scienca Kafejo. Ĉiuj prelegoj estis registritaj. En ili partoprenis po inter 60 kaj 145 kongresanoj. Dum la Scienca Forumo estis publike disdonitaj la atestiloj por la du AIS-kursoj, en kiuj okazis ekzamenoj: tri atestiloj en la kurso La ambigueco de Nombroinformo kaj 31 atestiloj en la kurso La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado.

Sciencaj aŭkciitaj objektoj

En la Aŭkcio de la 110-a UK, kiu sekvis la Sciencan Forumon, estis pluraj aĵoj rilataj al sciencaj verkoj kaj rezultoj. Kiel ĉiam estis aŭkciita la IKU-libro kun la subskriboj de ĉiuj ĉeestantaj prelegintoj. Aldone unuafoje estis aŭkciitaj la gajnintaj libroj de la Premio Pirlot kaj la atestiloj de la Premio Power. Fine AIS ofertis historian kravaton de la akademio.

Faka Forumo

Ĵaŭde posttagmeze dum la 110-a UK prezentis sin pli ol 30 fakaj asocioj dum la Faka Forumo, kunordigita de Wandel. La forumo daŭris unu horon kaj duonon kaj estis registrita. Interalie oni diskutis rilatajn temojn, kiel la planitan Almanakon de UEA (Kadar) kaj la revigligon de ISAE (Wandel).

Stelobservado

Nekutima elemento de la scienca programo de la UK estis la ekskurso E8, okazinta merkrede vespere, en la nova planetario de Brno. La 140 partoprenintoj ĝuis specialan 40-minutan 3-D-programon La Universo per ĉiuj sencoj, kun E-tradukado zorge preparita de la Loka Kongresa Komitato, kaj prelegon pri la historio de astronomio fare de Wandel, kiu sekve gvidis virtualan viziton de la nokta ĉielo helpe de la plej novaj rimedoj de la planetario.

Esperantologia Konferenco

La 47-a Esperantologian Konferencon, okazintan dum la 110-a UK, organizis Klaus Schubert kaj Bengt-Arne Wickström, nome de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Fakuloj kaj interesatoj pri Esperantologio, Interlingvistiko, lingvosciencoj kaj la mondaj lingvaj problemoj kunvenis la tutan kongresan ĵaŭdon. Oni aŭskultis ok altnivelajn prelegojn pri arkivoj de esperantaĵoj, uzo de Esperanto en la familio kaj en la mondo en epoko de artefarita intelekto, kontaktlingvistiko kaj propedeŭtiko rilate al Esperanto kaj la gramatiko kaj la interna ideo de la lingvo. Dum la konferenco regis bona etoso, ankaŭ dank'al la kafopaŭzoj, inter la ĉ. 50 partoprenantoj, multaj el ili tre aktivaj per demandoj kaj proponoj. La konferencon fermis ĝenerala diskuto pri interlingvistiko kaj mondaj lingvaj problemoj. Oni ankaŭ pritraktis la statuson kaj futurajn eblecojn de interlingvistiko en universitatoj ĉirkaŭ la mondo.

GAZETARAJ KOMUNIKOJ DE UEA



Mediterranea Esperanto-semajno

La Mediteranea Esperanto-Semajno 2026 okazos de la 14-a ĝis la 21-a de marto 2026, same kiel lastajn jarojn en la hotelo Miléade en Les Issambres, apud la Mediteranea marbordo en Suda Francio.

La semajno inkludos Esperantajn kursojn por tri grupoj kaj kompletan distran programon, kaj ekskurson por profiti la belan veteron de la Lazura Marbordo komence de la printempo.

La semajno komenciĝos sabaton la 16-an de marto je la 16:00 kaj finiĝos sabaton la 21-an de marto je la 11:00.

Kursoj estos gvidataj de elstaraj instruistoj:

- kurso 1 (komencparolantoj): Katalin KOVATS (Nederlando - Hungario)
- kurso 2 (paroliga-kleriga kurso pri Esperanto-literaturo): Pawel FISCHER-KOTOWSKI (Nederlando - Pollando)
- kurso 3 (paroliga-kleriga kurso pri mikronoveloj): Maurizio GIACOMETTO (Britio - Italio)

Pli da detaloj aperas sur la retejo de Esperanto-Provence aŭ vi povas sendi al ni retmesaĝajn demandojn.

Estas nur limigitaj eblecoj partopreni en tiu semajno. Do indas aliĝi rapide!

KURSOJ EN KASTELO GRESILJONO

Tri bonaj E-kursoj kaj eblo ekzameniĝi (24/10 - 02/11/2025)

Alain Delmotte: Lernadi per ludo en ĝojo (A1-A2)

Dalia Pileckienė: Litova metodo (B1-B2)

Renée Triolle: E-kurso per diskutoj (C1-C2)

Ekzamensesio de Franca Esperanto-Instituto 2025-11-02 9h

Aliaj aktivaĵoj: origamio kun Larysa Osadčuk, abako, naĝejo-saŭno, boule de fort, kantado, meditado, halovena vespero, prelegoj

Programo por infanoj

Ĥora (korusa) kantado kun Bernard Bigonnet kaj Interkant (21 - 28/10/2025)

Volontula komuna laboro, precipe ekstere kun Isabelle Nicolas, Elian Berger (21/10 - 06/11/2025)

Pli da informoj en Esperanto: <https://gresillon.org/au?lang=eo>

Aliĝu tuj en: <https://gresillon.org/al?lang=eo>

Prezredukto por tiuj kiuj bezonas kaj petas.

Skribu al gresillon@gmail.com



DUOBLAJ FERVOJAJ LINIOJ

Kiam en Britio oni ekkonstruis unuajn fervojajn liniojn, neniu el ili estis konsiderata kiel kompleta se reale ne temis pri duobla fervoja linio. Kompreneble, ĉi tio ne okazis same en ĉiuj ŝtatoj kie fervojoj komencis ekfunkcii, ĉefe pro la fakto, ke starigi duoblan linion kaŭzis duoblan koston. Tamen, profitoj estis evidentaj, tiel plioftiĝis cirkulado de trajnoj kaj samtempe oni evitis terurajn akcidentojn. Estas necese memori, ke tiutempe ne ekzistis ankoraŭ telegrafaj komunikoj, do ne estis eble koni ĝusta-momente ĉu trajno jam eliris el stacidomo aŭ, se pro ia kaŭzo, ĝi devis haltiĝi sur la rela platformo.



En Hispanio, unuamomente, la ĉefa celo estis kunigi per fervojaj linioj ĉiujn provincaj ĉefurbojn, ne necese fari tion per duobla linio. Tiel, fine de la 19-a jarcento ĉiuj hispanaj ĉefurboj, escepte Sorio, Teruelo kaj Almerio estis konektitaj fervoje, kompreneble ĉiuj ili per simpla linio.


Tamen, komence de la 20-a jarcento oni komprenis, ke se oni deziris plioftigi kaj profiti pli efike trajnan cirkuladon sur fervojaj linioj, ĉi tiuj devus esti duoble konstruitaj. En la jaro 1900 komenciĝis laboroj por duoblighi la linion inter Madrido kaj Hendajo, ĉe la franca landlimo. Same rilate liniojn ĉirkaŭ Barcelono, tie laboroj por duoblighi liniojn komenciĝis en 1901. Ĉi tiuj laboroj estis imponaj, fine de la 19-a jarcento nur 30 kmoj estis duoblaj linioj en Hispanio, sed en la jaro 1933 ili estis jam pli ol 1700 kilometroj.

Kiom da distanco ekzistas inter ambaŭ linioj?

Unue, estas necese koni kelkajn specifajn vortojn rilate duoblajn fervojajn liniojn. Tiel

Inter-aksa distanco: temas pri la distanco ekzistanta inter la meza punkto de ambaŭ linioj.

Inter-rela distanco: jen la distanco inter la randoj plej proksimaj de ambaŭ reloj.



Ni konu la leĝan inter-relan distancon. Kompreneble ĉi tiu mezuro variis laŭlonge de la jaroj. En 1855 ĉi tiu distanco estis 6 futoj kaj 6 coloj, tio estas 1,8 metroj. Ĉi tiu mezuro restis sen-ŝanĝa, ĝis nova dekreto en la jaro 1914, tiam oni plialtigis tiun distancon per 0.5 metroj kromaj. Ĉi tiu nova leĝa teksto menciis la evidentan danĝeron ekzistantan kiam du trajnoj kruciĝis kaj ĉe unu el il, i pordo estis malfermita, evidente sekurec-rimedoĵ tiuepoke ne estis sufiĉe kontentigaj. Krome, kelkaj vagonaroj, ĉefe transportantaj mineralojn en Andaluzio, estis pli larĝaj ol averaĝe.

Ĉi tiu mezuro restis sama ĝis la jaro 1985, tiam oni decidis ke la inter-relaj distancoj devus esti jenaj:

Inter-rela distanco	Rapideco de trajnoj
3,80 metroj	< 140 km/h
3,87	140 – 160
3,92	160 - 200
4,30	> 200

Sur kiu rela koridoro (dekstra-maldekstra) devas cirkuladi ĉiu trajno?

Sciate, ke rilate cirkuladon de aŭtomobiloj sur ŝoŝeoj ĉi tiu afero ŝanĝiĝas se ni troviĝas ĉe unu aŭ alia lando, ekzemple se ni veturas aŭton en Hispanio aŭ en Britio. Kio okazas do rilate fervojojn?

Nu, respondo estas tre simpla. Rilate trajnojn okazas kiel la cirkulado de aŭtoj, ĉiu ŝtato alprenis malsimilajn decidojn. Tiel, en Britio, Francio, Portugalio, Svisio, Japanio, Argentino, kaj multaj aliaj, trajnoj cirkulas tra la maldekstra rela koridoro. Aliaj kiel Germanio, Norvegio, Rusio, Usono kaj Danio tio okazas sur la dekstra.

Kaj en Hispanio? En la komenco ne ekzistis normo ĝenerale adoptita ĉi-sence. Do, uzitaj relaj koridoroj variis laŭ la regiono kaj fervoja linio. Tiel, nordaj trajnoj elektis la maldekstran koridoron, male centre kaj sude de Hispanio cirkulis tra la dekstraj reloj. Eĉ normo de la jaro 1954 pravigas la paralelan cirkuladon, tio estas, tra ambaŭ linioj kun sam-direkta cirkulando, kondiĉe ke sam-direkta trafiko estu tre intensa kaj oni certigis ke ne ekzistas kontraŭa cirkulado.



Paralela (aŭ sam-direkta) cirkulado

Tamen, leĝo en 1942 aprobis definitivan normon en Hispanio, laŭ kiu trajnoj devas cirkuli tra la dekstra rela koridoro, escepte kelkaj linioj, ĉefe norde de Hispanio, kie tradicie faris tion tra la maldekstra flanko. Elektro inter ambaŭ pozicioj fine ŝuldiĝis al tre simpla afero, ĉe preskaŭ ĉiuj lokomotivoj uzitaj en Hispanio ŝoforo sidiĝas ĉe la dekstra flanko.

Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

H.A.F.E.

fervojista@esperanto.ac

<https://hafe-19.websself.net>



LA 110-a UNIVERSALA KONGRESO EN BRNO

26.7.-2.8.2025

Al la kongreso aliĝis pli ol mil kongresanoj el 63 landoj. Tamen kelkaj ne povis veni pro diversaj kialoj. La kongreso okazis en la dua plej granda urbo de Ĉeĥio - Brno, situanta en la sudoriento. Gastigis ĝin Universitato de Mendel. La revuo Esperanto jam anticipe informis pri la urbo mem kaj pri Ĉeĥio ĝenerale.

Antaŭ la inaŭguro estis elektita nova estraro de UEA. Juna kaj talenta brazilano Fernando Maia fariĝis la nova prezidanto. La temo de la ĉi-jara kongreso estis "Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj".

En ĵurnaloj aperis pluraj artikoloj pri la evento, okazis elsendoj en radio kaj televido. Akurate aperadis bone redaktita kongresa kuriero "Drako de Brno". Eblis fotiĝi ne nur kun la Majstro. Ĉe la inaŭguro estis nomumitaj novaj honoraj membroj.

Kiel jam sciante, programo de Universala kongreso estas tre abunda. Oni ĉiam devas elekti inter pluraj samtempaj programeroj tion, kio plej interesas. Tre riĉaj estis kulturaj programeroj kaj vesperaj prezentaĵoj.

Sukcesa estis la "Ĉinia tago", kiu okazas ĉiujare en UK. La fotoekspozicion "Bela Esperanto, bela Ĉinio" admiris multaj samideanoj. Atenton kaptis ankaŭ la ekspozicio pri filatelo instalita ĉe la enirejo de la kongresejo. Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare okazis futbalmatĉo kontraŭ lokuloj en kiu venkis nia teamo.

Dum la kongreso ĉeĥoj multe kontribuis al la programo per diversaj prelegoj. Ne mankis gustumado de ĉeĥaj bieroj kaj vizito de bierfabriko. Interesatoj povis lerni la ĉeĥan lingvon, kiu estas tre komplika por eksterlandanoj, ekscii pri la ĉeĥa edukado, pri la ĉeĥa pedagogo kaj humanisto Komeĉio, kiu jam de la 17a jarcento proponis la ideon de la internacia lingvo por bona komunikado, pri la historio de E-muzeo en Svitavy, pri la trampa movado en Ĉeĥio, pri la naturo de Brno kaj pri ties ĉirkaŭaĵo. Bele prezentita estis la historio kaj la naturo de Ĉeĥio. Oni povis gustumi ne nur ĉeĥajn manĝaĵojn, sed ankaŭ la kulturon kaj folkloron, belajn pejzaĝojn dum multaj ekskursoj. Alloga estis vizito al la botanika ĝardeno, kaj fervojistoj kontribuis per informo pri planado konstrui novan, modernan stacidomon en Brno.



Okazis E-kursoj sub gvido de spertaj esperantistoj kaj KER-ekzamenoj. Interesis ankaŭ scienca programo, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de novaj teknologioj, artefarita intelekto, demenco kaj dulingvismo, estonteco de Esperanto, aŭtoraj duonhoraj kaj aliaj programeroj (ne eblas listigi ĉiujn). En la programo ne mankis belartaj konkursoj, UEA respondas, Amo seminario, IKU-prelegoj, Scienca Kafejo kaj la ŝatata aŭkcio.

Al la vesperaj programeroj kontribuis ankaŭ ĉeĥaj artistoj per koncerto de operkantisto Richard Haan, Jolana Smyčková kaj iliaj du knaboj kun la orkestro de la teatro Semafor. Muzikgrupo "Ŝafrda Memory Band" furoris en vespero per konataj kantoj. Teatro "Verda Banano" prezentis kabaredon "Kongresa Kafejo". La gejunula teatro "DOMA" el Svitavy prezentis teatraĵon "Lampiroj".

Inter esperantistaj artistoj koncertis Ĵele, Amira, Kaŝi, Tim Gallego, Martin kaj Bertilo, La Perdita Generacio, Duo Bemolo. Kajto kiel ĉiam ĝojigis kaj dancigis la publikon. Ĉi-foje Kim animis kongresan balon.

Diversa estis la oferto de duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj. Esperantistoj povis kun spertaj ĉiĉeronoj admiri plurajn kastelojn, belajn ĝardenojn, burgojn, grotojn, akvorezevuojn, bierfabrikon, muzeon de Romaa kulturo, aŭ vilaon Tugendhat. Aparta intereso ekestis pri la E-muzeo en Svitavy kaj pri la vespera stelobservejo en Brno kun klarigoj pri la somera ĉielo de nia fama astrofizikisto Amri Wandel.

Ĉifoje la nomŝildoj estis presitaj ambaŭflanke, kio estus imitinda en sekvaj kongresoj. Alia pozitiva oferto estis senpaga uzo de trafikrimedoj (krom taksioj). Bedaŭrinde mankis surpaperaj informoj pri Esperanto por scivolemaj preterpasantoj. En Francio oni solvas tion per disdono de etaj kalendaretoj kun koncizaj informoj pri E-gramatiko kun adreso por pli da informoj. Kelkaj salonoj por prelegantoj malgrandis.

Dum la internacia adiaŭa vespero prezentiĝis diversaj talentuloj el niaj vicoj. Ni povis spekti dancojn, kantojn, skeĉojn, muzikadon kaj ĥoruson sub gvido de Zdravka Bojĉeva.

Aparte notinda estas surekrana prezento de la raporto pri la kongresa semajno. Tiu resumo estas granda avantaĝo por rememoro pri la kongresaj aktivadoj. Ĉiuj esperantistoj certe travivis neforgeseblajn momentojn kaj renkontiĝojn kun malnovaj amikoj kaj novuloj.

Ĉeĥaj esperantistoj vere strebis organizi neforgeseblan kongreson kaj prezenti kiel eble plej bone la ĉeĥan landon. Ĉe la fino ili estis regalitaj per ladskatolaj bieroj kun simbolo de la kongreso.

La venontjara UK okazos en Aŭstrio en la urbo Graz, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto. Partoprenu ĝin!

Liba Gabalda



LA STRANGA ANGULO

Ĉapitro 16

Mi ne komprenas ŝin

Daŭre mi relegas la saman tekston skribitan sur malfaldita papero. Ŝi skribis stultajn pensaĵojn. Oni malfacile povas kompreni tion, kion ŝi skribis. Kio okazas? Mi ne komprenas ŝin!

Mi memoras tiun momenton, kiam mi renkontis ŝin en la trinkejo. Ŝi estis kelnerino, bele vestita. Mi multe ŝatis ŝian korpon. Miaj amikoj diris al mi "Iru! Iru! Ŝi sinsekve rigardas vin! Estu viro! Ĉasu ŝin!" Mi konfezas, ke malgraŭ tio, ke mi estas sufiĉe vira, mi iom hontas, se la afero temas pri rilato kun virinoj. Mi povas resti en sanga kverelado kun aliaj viroj, rompi dentojn, ricevi batojn... Ĉio pro iu stulta malkonsento pri piedpilko, motoro de aŭtoj aŭ ŝtata politiko. Sed se temas pri virinoj, mi ne tiom kuraĝas.

Ni, viroj kaj virinoj, estas sufiĉe malsamaj. Ni, la viroj, estas aktivaj, raciaj, pretaj por la luktado en la ĝangalo de la vivo. Ili, la virinoj, estas malfortaj, emociaj kaj bezonas, ke iu zorgu ilin, protektu ilin. La tuta naturo estas tia.

Ŝi estis vere bela. Mi ne estas poeto. Do mankas al mi precizaj vortoj. Sed mi multe ŝatis ŝin, la tutan korpon. Do fine mi alproksimiĝis kaj uzis mian tutan rimedaron, ŝajnas ke sukcese. Mi bezonis iri ĉiutage dum tri monatoj. Mia poŝo malpleniĝis. Fakte mi bezonis pruntepeti al kelkaj amikoj. Sed poste ŝi montris sian veran enan animon kaj jesis. Mi devis donaci vortojn kaj aĵojn. Virinoj estas tiaj. Ili multe ŝatas senti sin prinĉino. Do mi iĝis princo. Temas pri facila tasko. Mi estas tiel programita denaske.

Kiel dirite, mi estas vira viro. Mi varmiĝas facile. Ekde la komenco, mi deziris tuŝi ŝin kaj plu. Mi ne rakontos ĉion. Eble ĉi tion legos alia viro. Kaj ŝi estas mia. Vi ne konfuziĝu. Gravas, ke mi bezonis penon ĝis atingi la celon. Ŝi ŝajniĝis dubema. Ili devas fari tion, por ke ni, la viroj, sentu ke ili puras. Por mi ne estas tiom grava. Mi scias, ke ŝi estis pura, ĉar mi tiam multe demandis kaj esploris. Kaj ĉiuj certigis.

Feliĉe okazis io en ŝia familio, kaj ni devis geedziĝi. Ŝi ofte diras, ke ŝi ne sufiĉe konis min, kaj ke la geedziĝo okazis inter du nekonatoj. Kompreneble tio estas troigo. Paro ne bezonas scii unu de la alia, babili ĉiutage aŭ io simila. Sufiĉas scii la rolon de ambaŭ kaj ne konfuziĝi. Mi, ekzemple, neniam faris ion rilate al la domaj taskoj. Ŝi estas la dommastrino, kompreneble. Mi multe penas ekstere, laborante ŝvitante suferante por la celo teni la familion. Kiam mi revenas hejmen, mi bezonas pacon kaj ripozon, ne pli da taskoj.

Ŝi havis la stultan ideon daŭrigi siajn studojn irante al la universitato kaj poste labori, kiel biologino. Vere stulta ideo! Mi konvinkis ŝin, pri la bezono resti hejmen. Mi tiam jam havis postenon kaj alportis monon hejmen. Ŝi ne. Do, ne eblis diskuto. Jarojn poste ŝi komencis kulpigi min, dirante ke ŝi lasis sian estontecon pro mi. Alia stulta aserto! Ŝia estonteco ĉiam estis tia! La ideo iĝi biologino estis la eraro, ne la ĝusta vojo.

Hodiaŭ estis malfacila tago por mi. La ĉefo plendis pri mi antaŭ miaj kunlaborantoj. Mi deziris bati lian vizaĝon. Mia tuta korpo estis preta salti. Sed mi devas ne fari tion, ĉar mi ne facile trovos alian laboron. Ni, la viroj, kelkfoje devas malfacile decidi, kaj neniu scias pri tio. Kiel diri! Mi volis rankonti tion al ŝi, montri, kiom mi suferis kaj kiel altnivele mi kondutis, eĉ kiam mi haltigis Pakon, pere de fortaj vortoj, kiam Pako komencis moki pri la okazaĵo. Mi ankaŭ sentas iom da doloro en la brusto, je la maldestra parto. Eble mi havas gravan problemon ĉe la koro. Estus bone informi ŝin, por ke ŝi sciu. Kaj grava afero estas, ke la aŭto komencis montri strangan bruon revenante hejmen. Mi ne vokis iun. Mi men haltis, esploris kaj solvis. Tio estas ŝparo de mono kaj de tempo. Mi estis preta rakonti tion al ŝi. Ankaŭ okazas, ke survoje mi estis aŭskultante la radion. Sebastiano, la politikisto, estis parolanta. Li nur diris stultaĵojn. Mi bone scias, pri kion oni devas fari. Sed tiu aĉa homo nur mensogas. Mi estis kolera. Ŝi ŝatas aŭskulti min rilate al la analizado de la nuntempo. Mi klopodas scii kaj volonte instruas ŝin. Estas vero, ke ŝi neniam petis klarigojn nek vortumas pri ŝato; tamen mi scias, ke ŝi atendas mian analizadon. Sed mi ne povas diri ion, ĉar ŝi ne estas nun. Anstataŭ ŝi, estas tiu malfacile komprenebla teksto.

Ŝi plendas, dirante, ke ŝi ĉiam estas hejme purigante plankon, robojn, manĝilojn kaj tiel plu. Kompreneble! Tio estas ŝia tasko! Ĉu mi ankaŭ devas tion fari? En kia mondo ŝi vivas? Mi aĉetis multekostan televidon por kiam ŝi enuiĝas, ĉar certe ŝi enuiĝas havante tiom malmulte da laboro. Ni ne parolas pri tio. Fakte ni parolas pri nenio, kaj ŝi ankaŭ plendas pri tio. Ankaŭ tio estas nekomprenebla. Pri kio ŝi volas babili? Kio funkcias malbone? Kio okazas? Ŝi vere estas malfacila virino!

Lastatempe mi suspektas, ke ŝi multe babilas kun amikinoj. Se ŝi estas malfacile komprenebla, ŝiaj amikinoj eĉ pli. Ili kapablas telefone paroli senfine. Mi ne scias tion, pri kio ili babilas. Mi pensas nun, mi ekmemoras, ke ŝi kelkfoje ploris. Kial ŝi ploris? Mi estas fidela viro. Mi alportas monon. Mi aĉetas aĵojn por ŝi. Pri sekso mi ne diros ion; nur ke mi kontentas kaj bone faras, kaj mi imagas, ke se iu demandus al ŝi, ŝi dirus ankaŭ, ke ŝi kontentas, mi imagas. Ni loĝas en bona domo, kun komforta kuirejo kaj salono. Ŝi havas ŝrankon kun belaj vestaĵoj, malgraŭ tio, ke mi postulis, ke ŝi forĵetu kelkajn, kiuj ne taŭgas por respektbla edzino. Do kio okazas? Kial ŝi ne parolas klare? Kial mi devas diveni kvazaŭ mi estus magiisto? Kiu estas la signifo de tio, kion ŝi skribas en la teksto? "Mi sentas min neviva, herbo enskatolita, nur atendente la nenion". Kiu metis tiujn vortojn en ŝian cerbon?

Vere mi ne komprenas ŝin.

Sed bone, mi atendos. Ŝi venos kaj pretigos mian vespermanĝon, same kiel ĉiam. Mi atendu.

Viko

EKOLOGIAJ ŜULDOJ

Ni ĉiuj konscias pri la malfacila ekologia momento kiun ni trapasas. Eĉ en Hispanio ĉisomere ni suferis multajn brulegojn pro troa varmeco, aŭ ĉefe pro malatento al la naturo dum printempo aŭ aliaj sezonoj; Krom tio okazas militoj en Ukrainio kaj la eskalado de perforto en Gazao, kaj krome la malkonataj aŭ forgesitaj militoj en Afriko.

La paco estas sekvo de la justico kaj la juro, sed la justico ne estas nur leĝo aŭ moralo, sed fundamenta valoro kondukanta al paco. Kiam la homaro defendas la justicon, oni kreas rimedon kie la paco ekfloras. Ĉu tio okazas nun? Mi multe dubas.

Nuntempe la paco estas minacata pro la armilaro, la regionaj konfliktoj, kaj pro la malrespekto al la naturo. Tio kreas ŝtatan nestabilecon kaj pro tio la damaĝo al la medio kondukas al problemoj kiam la homaro ne povas daŭrigi uzante la terajn rimedojn kiel antaŭe. La nuntempa vivstilo de nia societo hedonista kaj konsumema damaĝas la naturon kaj nian propran vivon, kaj kaŭzas ĉu la mankon de harmonio, ĉu la tiel nomata “ekologian ŝuldon”. Tiu koncepto devigas nin agnoski ke la tre industrialigitaj landoj ofte estas respondecaj de la troa dissendo de gasoj kaŭzantaj la “forcej-efiko”, la perdo de biodiverseco kaj ĉiu poluado. Tiuj “riĉaj landoj” konstruis sian prosperon ekspluatante la naturajn rimedojn de evoluantaj landoj, kiel okazas nun en Afriko. Do estas vera ekonomia ŝuldo inter la Nordo kaj la Sudo pro la komerca malekvilibro kaj la troa uso de naturaj vivrimedoj. Kompreneble tiu ekologia ŝuldo estas ligita al la financa ŝuldo kaj tio estas grava afero por la estonteco.

Do, ĉu la riĉaj landoj devas pensi pardoni la ŝuldojn al landoj kiuj neniam povos pagi? Eble tio estus justa sed en la nuna mondo mi opinias ke tiuj malriĉaj landoj estas pli ekologiaj ol la riĉaj kaj pro tio oni devas agnoski al ili la “ekologian krediton” kiuj tiuj landoj havas rilate la riĉajn. Kiam ni havos ekologian justicon? Nur kiam novaj vivstiloj baziĝos sur solidareco kaj sobereco.

M.R. Urueña



REFUTO DE POEZIO KAJ PAROLO

Post Aŭŝvico,
verki poemon estas barbare,
dekretis Adorno.


Post Aŭŝvico
ne plu eblas verki poezion
tamen jes amasmurdi sen honto.

Post Aŭŝvico
jen Palestino masakrata
antaŭ ĉies komplica manko de parolo.

Post Aŭŝvico
Gazaon kaj Cisjordanion ruinigu
Israelo, la plej humanitara forto.

Kaj fine, post Cisjordanio kaj Gazao,
post Palestino forneniigita,
plene malestos sencohavaj vortoj.

Jorge Camacho



Noto

humanitara: (el ReVo) 1. Celanta mildigi homan suferon, aparte en krizaj situacioj kiel malsatoj, milito, naturkatastrofoj ktp; 2. (pri krizo ks) Kaŭzanta suferadon de multaj homoj, minacanta la vivon de multaj homoj.

Hispanaj kantoj tradukitaj de Liven Dek

For vian nazon!
(*A quién le importa*)

Kantas: Alaska kaj Dinarama

La homoj min kritikas,
klaĉante sen modero,
ofendas min publike.
Mi fajfas kun fiero.

Mi homas ja per propra karaktero,
sen sindevigoj kaj en libero.

Mi vere ĝenas ĉiujn
per aŭro de misfamo,
torture ronĝas ilin
envio kaj malamo.

Nu, kial ve,
la mondo min akuzas
ĉu mia vivo ĝin konfuzas?
Nepre mi decidu do la vivon
kiun mi deziras ja por mi.

For vian nazon
el miaj diroj!
For vian nazon
el miaj faroj!
Mi estas mi
kaj kondutos plu
same kiel nun.

For vian nazon
el miaj diroj!
For vian nazon
el miaj faroj!
Mi estas mi
kaj kondutos plu
same kiel nun.

Ja eble nur mi kulpas
pro mia ribelemo,
sed estas tro malfrue



Mi restos plu ĉe mia opinio
flegante mian reputacion.

Nepre mi decidu do la vivon
kiun mi deziras ja por mi.

For vian nazon
el miaj diroj!
For vian nazon
el miaj faroj!
Mi estas mi
kaj kondutos plu
same kiel nun.

For vian nazon
el miaj diroj!
For vian nazon
el miaj faroj!
Mi estas mi
kaj kondutos plu
same kiel nun.

Aŭtoroj: Ignacio Canut kaj Carlos Berlanga
Tradukis: Liven Dek

BIRDOPROVERBOJ

Iam homoj ne rigardis malsupren, rigardis supren kaj vidis ĉielon, nubojn, stelojn, birdojn ktp. Nun ili vidas aŭtojn, reklamaĵojn, turistojn, homamasojn ktp. Kiam homoj vidis birdojn, oni konis, ŝatis, aprezis ilin; oni enmetis ilin en ĉiutaga konversacio; oni enmetis ilin en la amikaro. Ekzemple delonge oni rilatigis iliajn kondutojn al interesaj aferoj, nome devinado. Eniris en la homa kulturo granda parto de esprimoj, lingvaĵoj, proverboj, kiuj nun iom post iom malaperetas. Ankaŭ en la Esperanta Proverbaro. Ekzemple Zaĉjo kolektis tiujn esprimojn menciatajn la vorton "birdo", kiuj aperas en la vikipedia artikolo pri birdoj: "Birdo kantas laŭ sia beko", "Koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago", "Tute libera, kiel birdo aera". Eble en aliaj lingvoj estas similaj esprimoj.

Tamen estas multaj aliaj similaj pribirdaj esperantlingvaj esprimoj kaj proverboj, ekzemple "Se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas". Ŝajne tio estas saĝa alvoko al prudento, silentemo kaj evito de troigoj, ĉu ne? Pluraj proverboj mencias specifajn birdospeciojn, ekzemple "Korniko vundita propran voston timas". Mi supozas, ke hispanlingvanoj povos trovi similaĵojn kiu mencias ne birdon, sed katon. Pro dejarmila kunvivado, hundoj, katoj kaj birdoj aperas ofte en kulturaj esprimoj, ĉu ne? Kaj birdo foje estas sinonimo de dezirita atingo, ĉar foje de tiu dependas la survivado: "Ĝi estas ankoraŭ birdo sur la tegmento" aŭ "Ĝi estas ankoraŭ pasero en aero". Foje la atingo povas esti neatendita: "Celis paseron, trafis anseron".

Sed estas tiom trezora la enhavo de esprimoj, ke ili povas esti kontraŭdiraj; birdo povas esti ankaŭ negativa afero: "Malgranda birdeto, sed akra ungeto". Aliajn fojojn la mesaĝo povus esti iom kaŝe: "Rostita kolombeto ne flugas al buŝeto".

Denove kornikoj aperas en "Inter kornikoj ne konvenas predikoj". Ĉu denove alvoko al silentemo? Kaj ofte korvedoj instruas homojn al konvena konduto, nome solidareco: "Korvo al korvo okulon ne pikas". Tamen korvedoj ofte starigas malamon ĉe homoj! Sed ni povas tiom lerni el ili: "Nigran kornikon sapo ne blankigos". Same oni povas lerni el kontemplado de naturaj aferoj: "Unu hirundo printempon ne alportas", kio poste povas utili nur kiel metaforo.

Homoj delonge emis al komparo kun birdoj: "Kiu naskiĝis sciuro, ne fariĝos vulturo". El kiu alia versio estas "Kio konvenas al sciuro, ne konvenas al vulturo". Kaj ankaŭ al komparo unu kun alia: "Unu pasero alian valoras", "Kia la birdo, tia la kaĝo". Foje birda konduto estas spegulo de homa konduto: "Koko krias fiere, sed ne danĝere". Aparte kiam oni aludas al danto tiel: "Bela birdo!"

Eĉ plej amindaj birdoj povas kaŝi malbonaĵon, same kiel homoj: "Eĉ najtingalo ne estas sen galo". Finfine oni ne parolas pri birdoj, sed pri homa konduto: "Birdo petolas, kiom ĝi volas". Bona konduto povas bone rezulti: "Pasero sperta estas lerta".

Multaj el tiuj ekzemploj ekzistas ankaŭ en aliaj lingvoj, inklude en la hispana; aliajn oni povas klopodi por traduki. Tamen ne ĉiam tio estos facila. Kaj inverse. Ekzemple mi baraktis kaj malsukcesis traduki tiun jenan hispanan proverbon, kion mi proponas kiel parolfino: "Cuando el grajo vuela bajo, hace un frío del carajo". Bonan sorton!

Kani

SED, ĈU VERE ILI TION NE VIDAS...?

Jam de antaŭ iom longa tempo mi ne publikigas; kaj timinde, ke pli kaj pli mi malpli publikigos. Mi pigras pri tio. Estas io kiel prediki en la dezerto, sed grandigite je la sesa potenco. Aldone, mi ne ŝatas ripeti min nek iĝi tedulo. Tion, kion mi devis diri, mi jam diris kelkajn fojojn kaj servu kiel resumo kion mi enhavigis en mia pasinta artikolo “Mi pardonpetas...”, verkita jam antaŭ kelkaj monatoj. Tamen, hodiaŭ mi emas sidiĝi kaj denove iomete verki. Ŝajnas kiel deziro fari ion kio helpu min senti min pli senpezigita, kaj intelekta kaj morale.

Ĉi-foje mi decidis enfokusiĝi en demando kiun mi faras al mi de mia junaĝo: por kio utilas, ke scienco antaŭeniras, ke pozitivaj aĵoj estas konstruitaj, ke oni celas krei pli justan kaj pli belan mondon se, iam ajn, povos alveni “malamika” armeo kaj ĉion detruos en tre kurta tempo? Por kio utilas tiom kaj tiom da jaroj da strebo, da progreso, da celo, ke kaj racio kaj bono venku sur intelekta blindeco, se ankoraŭ restas perfekte laŭleĝe, ke bomboj estu faligitaj sur loĝantaroj, loĝejoj kaj kamparoj...? Kiucele oni volas sendi spacan ŝipon al Marso, se ĉi tie ni estas tute nekapablaj solvi eĉ ne unu solan militon? Ĉu vere registraranoj kaj mezaj civitanoj - ĉu riĉaj aŭ malriĉaj- tion ne vidas...?



Ie, pro iu grava kialo

Ja evidentas, ke la mondo iĝas ofte neloĝebla loko kaj ke estas neeviteblaj tiuj naturaj katastrofoj kiujn ni ĉiuj konas. Sed tio, ke aviadilo malŝarĝu bombon sur “celo” (ĉu civila, ĉu arma, ĉar fine la viktimoj estos ĉiukaze homoj), jen io tute evitebla. Se ni tion ne vidas tiel, oni devas esti certaj ke ni estas tre sensciaj kaj ke, kiel intelekta spe-

cio, ni tute fiaskis. Kaj hodiaŭe, al mi tio malplej bona ne estas ke la homaro kreis strukturon socia-politikan absurdan, kruelan kaj memdetrueman; tio malplej bona estas ke ŝajnas ke neniu (eĉ ene de “progresemaĵ” sintenoj) kapablas vidi ke por eliri tian situacion alia konstruaĵo devas nepre esti farita, sur aliaj bazoj. Ni iru ĝis la komenco.

Vivo en nia planedo aperas post longa evoluo kiu povas nur esti komprenata sin turnante al tiuj streboj kiujn scienco daŭre faras -tra generacioj kaj jarcentoj- celante doni racian respondon al tiuj duboj kiujn iu ajn mortonta estaĵo starigas al si tra sia vivo. Kaj ĉio estas tiel kaj tiom kompleksa, ke eĉ scienco ne kapablos klarigi nek solvi multajn el la duboj kiujn ĉi-rilate ni starigas al ni. Laŭ geologia kronologio, la *homo sapiens* (ĉu vere *sapiens* signifas saĝan...?) aperas je la fino de la rakonto. La ekzistado de tiu ĉi nova specio estas verdire tre simila al tiu de iu ajn alia vivanta estaĵo havinta iom da intelekto kaj iam ekzistinta. Tio estas, per granda peno ĝi provas kompreni kiun rolon ĝi faras ĉi tie, kaj provas adaptiĝi al la medio kiu ĉirkaŭas ĝin, kaj luktadas direkte al sia postvivado. Post longa evoluo, ĝi fine vivas en socio kaj starigas politikajn instituciojn kiuj celas reguli la internan kunvivadon ene de ĉiu grupo kaj ankaŭ establi la rilatojn al aliaj eksteraj grupoj. Kun la celo helpi sin ĉe la lukto al postvivado, ĉiu nova socio kiu naskiĝas -aŭ, se prefere, ĉiu nova civilizacio- sentas ke oni bezonas helpon de transcendaĵoj superaj estaĵoj (gedioj, gediaĵoj, ĉiuspecaj fantomoj); kaj ĝi ankaŭ sentas ke oni bezonas forĝi la ideon de grupa unueco fronte al eventualaj eksteraj malamikoj kiuj povus ataki ĝin. Tiamaniere stariĝas la kasto pastra kaj milita. Kaj ĉio povus esti resumita pere de devizoj kiaj “Dio, patrujo, reĝo”, “Ĉio por la patrujo”, “Patrio aŭ morto”, “Patrio, socialismo kaj venko” kaj aliaj similaj trempitaj de grandaj vortoj kiuj havas ion komunan: oni avertas kaj oni pravigas ke, se la kazo alvenos, oni uzos perforton por venki tiun kiu pensas malsame ol ni, por venki, do, nian malamikon.

Sed, kiu estas tiu malamiko? Jes, mi jam scias ke eblas multaj specoj de malamikoj, dependante ĉu oni staras antaŭ batalo nacio-identiga, religia, ekonomia, socia, sporta... Kaj jen mi alvenas al tiu punkto kiun mi celas atingi, kaj mi starigas novan demandon, kiu fakte enhavas kelkajn kunigitajn: Ĉu vere ni ne povas vidi ke oni povas konstrui nenion (tutcerte nenion) pere de lukto de iuj kontraŭ aliuloj; ke absolutaj veraĵoj -tiuj kiuj ŝajne pravigas perforton- ne ekzistas; ke se oni ne remas je la sama direkto oni ne povas alveni ĝis la haveno celata?

Malfeliĉe, la historia socialismo (je ties diversaj tendencoj kaj manieroj aplikiĝi ĉe la praktiko) malkapablis liberiĝi el certaj ŝarĝoj kaj balastoj, kio senrajtigas ĝin plue sin proponi antaŭ la homara historio kiel decan opcion por la estonteco. Efektive, tiuj socialismaj landoj daŭre stimulis patriotismon kaj daŭre fabrikis armilojn. Kaj, kvankam principe oni ne plu kredis je Dio, oni igis marksismon religio, kaj ĉiu alineo el *Das Kapital* iĝis absoluta vero. Oni interŝanĝas iun blindecon por alia; sed oni daŭre restas blinda. Ĉar ni daŭre ne rimarkas ke niaj plej radikaj instinktoj, se ne sufiĉe regataj, alvenigos nin al perforto, detruo kaj verŝado de sango (aliula, sed foje ankaŭ propra sango) cele defendi tre justajn proponojn pri kiu ni estas ege konvinkitaj. Sed oni devas klare kompreni, ke tiu nura revolucio kiu validos estos tiu kiu baziĝos sur racio, rezonado, modereco, amo kaj deziro pri paco. Se tiuj elementoj ne estos uzataj, tiu revolucio ne validos. Punkto!

Ĉiutage mi tristiĝas pro tio, ke mi vidas ke eĉ tiuj plej progresemaj NRO-j ne kapablas vidi preter siaj nazoj. Por ekzemplo, Kuracistoj sen landlimoj (france: *Médecins sans Frontières*) petas ke oni ne bombu hospitalojn, se mi vidas nenion rilate la eblecon bombi aliajn celojn; Save the Children (angle por: Savu la infanojn) ege emfazas tion, ke infanoj ne estu viktimoj ĉe militaj konfliktoj, sed mi ne vidas ke ili menciigu aliajn eblajn viktimojn; kaj ĉiuj organizoj kiuj lukta kontraŭ subgrundaj minoj aŭ kontraŭ atomaj armiloj ŝajne forgesas ke ankaŭ normalaj armiloj mortigas kaj detruas egalmanniere aŭ je tre simila maniero. Sed, ĉu vere ili ne vidas tion...? La solvo kiun oni proponu devas esti -almenaŭ teorie- ĝenerala kaj por ĉiuj. Ĉar se ĝi ne estas tia, ĝi ne taŭgos.

Mi ege deziras ke iun tagon la organizo Unuiĝintaj Nacioj alrigardu tiajn aferojn same kiel mi ilin alrigardas. Kaj ke ĝi eknomigu io kiel Organizo de Unuiĝintaj Homoj; kaj ke ni komprenu ke tiuj popoloj iel subpremataj ne ĉesos esti tiaj pere de la kreado de nova ŝtato, kun ties landlimoj, armeo, leĝoj pri eksterlandaneco kaj seĝo ĉe UN. Ne plu estos subpremataj popoloj kaj ne plu estos maljustaj kaj senutilaj mortoj (inkluzivante tiujn de tiuj migruloj kiu mortas dum la vojo por alveni al pli bona vivo) tiam, kiam pere de la edukado oni malmuntu la absurdan konstruaĵon kiu kondukis nin al tiu loko kie ni restas de antaŭ miloj da jaroj, kaj kiu ŝajnas ne havi eliron.

Kaj al tiuj grandaj imperioj, ne gravas je kiu speco ili apartenas, mi memorigas la konatan latinan proverbon, kiun mi ege ŝatas: *Sic transit gloria mundi* (Tiel preter-iras la monda gloro). Tiuj imperioj neniam devus esti ekzistintaj, sed ili ne pridubu la jenon: ili falos.

Mi salutas vin ĉiujn ĝislarevide. Mi revenas al mia ĉambro-angulo, kun miaj kvar kolorkrajonoj kaj miaj malmultaj libroj.



Ĉu ne estas pli bone tiel...?

Juan García del Río

IOM DA MATEMATIKO (19)

Aritmetikaj operacioj: Adicio.

En nia memoro restas gravurita la aserto, ke nia nuna nombrosistemo estas “dekuma kaj pozicia”.


La unua vorto, “**dekuma**”, signifas, ke kiam ni kalkulas la nombron de objektoj de iu aro, ni reprezentas ilin per ciferoj 1, 2, 3, ..., 9. Kaj kiam ni alvenas al dek, ni ne uzas novan simbolon. Ni diras, ke tiam ni kompletigis unu unuon de alia klaso (unu deko) kaj ni reprezentas ĝin kiel 10, t.e., unu deko kaj nulo unuoj; kaj poste ni daŭrigas per 11, t.e., unu deko kaj unu unuo, k.t.p.

La alia vorto, “**pozicia**”, signifas, ke se ni troviĝas antaŭ du numeroj kiel 135 kaj 513, ili ne reprezentas la saman nombron, malgraŭ ke la ciferoj uzataj estas la samaj. En 135, “5” reprezentas kvin unuojn, sed en 513, la sama “5” reprezentas ankaŭ kvin unuojn, sed de la tria klaso (centoj), t.e., kvincent.

Ambaŭ propraĵoj kune permesas al ni reprezenti kiun ajn nombron pere de nur dek ciferoj (0, 1, 2, 3, ..., 9), kio faras, ke nia nuna nombrosistemo estu la plej perfekta el la ĝis nun ekzistantaj, post jarcenta evoluo. Tiu perfekteco etendiĝas ankaŭ al la aritmetikaj operacioj, kiujn oni plenumas tre facile kompare al aliaj nombrosistemoj (pensu, ekz., pri adicio en la romia nombrosistemo).

Nu, ni okupiĝu hodiaŭ pri unu el tiuj operacioj, eble la plej facile realigebla: adicio.


Por tio, ni uzos helpilon sufiĉe konata: abako (vorto, kiu devenas el la greka “abax”-Tabulo aŭ de la hebrea “abq”-Polvo, sablo, reference al praa kutimo fari kalkulojn kaj geometriajn desegnojn sur tabulo kun sablo).



Estas diversformaj abakoj. Ni uzu tiun de la bildo, tre taŭga por nia nuna nombrosistemo. Ĝi konsistas el diversaj vertikalaj stangoj. Sur ĉiu stango oni surfadenigas 9 bidojn ŝoveblajn laŭlonge de la respektiva stango. La unua plej dekstra stango montras unuojn simplajn, la dua dekojn, la tria centojn, ktp. Ofte, meze, laŭlonge de la bazo, staras ligna ekrano por laŭbezone kaŝi malmankantajn bidojn.


Sur la supra bildo estas reprezentata la numero 4532.

Nu, ni supozu, ke nia celo estas adicii la numerojn 354 kaj 675. Unue, ni reprezentu ilin per abako:



Unua rimarko: danke al abako, ni ne vidas la numerojn kiel tuton, sed disigitaj ciferoj laŭ ties klaso al kiu ili apartenas (unuoj, dekoj, centoj, miloj, ...). Tio gravas ĉar oni adicias unuoj al unuoj, dekoj al dekoj, centoj al centoj, ktp.

Ni adiciu:



Atentu, ke la ordo laŭ kiu oni adicias la ciferojn ne gravas. Nur gravas adicii ciferojn samklasajn.


En la unua klaso (unuoj), la rezulto estas naŭ (9), t.e., 4+5.

En la dua klaso (dekoj) ni havas dekdu (12) bidojn, t.e., 5+7. Oni prenas dek por kompletigi unu unuon de la tria klaso (unu centon). Sekve, en tiu dua stango restas nur du bidoj.

En la tria stango oni havis naŭ bidojn al kiuj oni devas aldoni tiun antaŭe kolektitan en la dua klaso. Tiel oni havas dek bidojn de la tria klaso (centojn).

Denove, tiuj dek bidoj de la tria klaso (centoj) kompletigas unu unuon de la sekva kvara klaso kaj restas neniuj bido en la tria stango.

Do, la fina rezulto estos:



Rimarku, unu fojon plian, ke kvankam en abako eblas adicii ciferojn al aliaj de la sama klaso sen okupiĝi pri specifa ordo rilate la klasojn, en la praktiko oni instruis nin fari la operacion de dekstre maldekstren. Ne temas pri kaprico, sed pri faciligo plenumi la operacion.

Se vi scivolemas, provu adicii la du antaŭajn nombrojn de maldekstre dekstren (ne estas ŝerco. Eblas plenumi tiun taskon).

Jesús M. García Iturrioz
jmgiaa@hotmail.com



84-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



Portugalete, de la 14-a ĝis la 18-a de julio 2026

ALIGILO

Plenigu tiun ĉi aligilon, kaj sendu al la sidejo de la Grupo Esperantista de Bilbao - Barrencalle Barrena, 7-1ª dcha 48005-BILBAO ESPAÑA / HISPANUJO.

Oni ankaŭ povas uzi la retadreson portukongreso@gmail.com, aŭ la formularon troveblan en la retejo de Hispana E-Federacio (HEF) <https://kongreso.esperanto.es/>

PERSONA NOMO _____ FAMILIA(Ĝ) NOMO (Ĝ) _____

ADRESO _____

POŝTKODO-URBO _____ LANDO/REGIONO _____

RETADRESO _____ TELEFONNUMERO _____

MEMBRO DE HEF: JES NE

NASKIĜDATO _____ (nur por statistikoj kaj rabatoj)

DATO DE PAGO⁽¹⁾ _____ PAGMANIERO _____

KATEGORIO (Nro.) _____ KOTIZO _____

DONACO _____ SUMO _____

KOTIZOJ			
KATEGORIOJ	Ĝis 31/12/2025	Ĝis 31/03/2026	Post la 1-a de aprilo 2026
1. Membro de HEF	40€	50€	60€
2. Samadresano de HEF-membro	30€	40€	50€
3. Ne membro de HEF	50€	60€	70€
4. Samadresano de ne membro de HEF	40€	50€	60€
5. Juna membro de HEF (naskiĝinta post 01/08/1996)	20€	30€	40€
6. Junulo ne membro de HEF (naskiĝinta post 01/08/1996)	25€	35€	45€
7. Junulo naskiĝinta post 01/08/2008	0€	0€	0€
8. Eksterlandano naskiĝinta antaŭ 01/08/1996	30€	40€	50€
9. Samadresano de eksterlandano (naskiĝinta antaŭ 01/08/1996)	30€	40€	50€

Bonvolu pagi la kotizon per enbankigo, nepre indikante en la teksto "Kongreso" kaj vian nomon, en la jena bankokonto:

- KONTOPOSEDANTO: GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO
- BANKO: KUTXABANK
- IBAN: ES44 2095 0023 5122 1800 1550
- Swift (BIC): BASKES2BXXX

ALIAJ INFORMOJ

Pri komunaj vojaĝoj kaj ekskursoj ni informos poste.

Mi pretas partopreni en la programo (aparte menciu proponon):

Aliaj komentoj: _____